


Revuo
ESPERANTO
Internacia

N-ro 589 (12) DECEMBRO 1954



Tutmonda Meteorologio

(Vidu paĝon 331)

Revuo ESPERANTO Internacia

N-ro 589

Decembro 1954



La Vivo de Zamenhof

LA 15-a de decembro estas por ni Esperantistoj, tago de danko al tiu ĉi viro kiu kreis la lingvon amatan. For de ĉia vortriĉa gloriĵo ni rajtas memori D-ron Zamenhof je la tago kiam li naskiĝis. La rememoro je la Majstro estas ero de la *Interna Ideo* de la lingvo, la mistiko de l'Esperantismo. Eble iuj opinias ke mistiko ne havas lokon en la racia epoko en kiu ni vivas. La detruantoj de formoj de mistiko ĉiam kreas novan, laŭ ili la unikan.

La grandeco de Zamenhof precize ne troviĝas en tio ke li kreis Esperanton, sed en lia scio pri limo kaj mezuro. Neniam li volis ke oni nomu lin "kreinto" sed "iniciatinto" de Esperanto, doninto de la bazo. Li estis homo ekstreme modesta, ne-trudema kaj aŭskultanto de l'aliuloj. La vorto *mi* estas malofta en liaj skribaĵoj kaj kiam li konsilis ion li evitis ordonan formon.

Lian vivon priskribis jam pluraj verkistoj kiuj konis lin. La plej konata inter tiuj biografioj estas tiu de Edmond Privat "Vivo de Zamenhof" ekzistanta en angla lingvo kaj tradukita eĉ en la ĉinan. En franca lingvo, Sinjorino Descoeudres en

Genève, priskribis la vivon de Zamenhof en verko titolita "Vies héroïques" (Vivoj heroecaj). Interesa provo de romaneca biografio estas la libro de A. Lopez Luna, Buenos-Aires, en hispana lingvo: "Zamenhof, iniciador del Esperanto." Pli malpli detalaj sobraj priskriboj de tiu ĉi vivo estas troveblaj en broŝuroj de E. Drezen, en la biografio verkita de la frato Leono kaj en la libreto "Galerio de Zamenhofoj."

Ĉi-tiuj verkoj permesas al ni koni D-ron Zamenhof. **"Neniu estas reĝo antaŭ sia servisto,"** diris iu eminentulo kiu devis scii tion! Nu la personoj kiuj vivis kun la Majstro, la familio, la servistinoj havis por li tiun-ĉi respekton kvazaŭ instinktan, ke oni estas vidalvide de "granda" homo.

Ĉu estas pro tiu kvalito de Zamenhof ke oni akceptis la saĝajn admonojn en la *Fundamento de Esperanto*? Liajn sendoktrinajn konsilojn en *Lingvaj Respondoj*? Li estis la rekta malo de Prelato Schleyer, homo aŭtoritateca, memcerta. En jaro 1924 mi parolis kun fratino de eminenta ano de Volapük en Svislando, D-ro M. Ŝi donacis al la Biblioteko de UEA grandan oleo-

penetraĵon de Prelato Schleyer kaj je tiu ĉi okazo ŝi rakontis al mi karakterizan trajton lian. Vizitinte D-ron M., Prelato Schleyer fiere parolis pri siaj lingvaj konoj kaj metinte la fingron sur la frunton li diris: "Estas io en tiu ĉi cerbo". Ĉu vi povas imagi al vi la iniciatinton de Esperanto paroli tiel? Certe ne, kaj en tio troviĝis lia grandeco: la scio pri mezuro kaj limo de ĉio homa.

"Heroo, profeto, poeto: tiajn diversajn nomojn ni donas al eminentaj homoj. Ili ŝanĝas kun la tempo kaj la loko. Ili estas esprimo por ilia diverseca agado; ili sin gvidas laŭ la vivspaco, en kiuj ili disvolvas siajn fortojn. La ĉirkaŭo de heroo estas la bazo por tia diferencigo. Heroo povas esti ĉio, poeto, profeto, reganto, reformatoro. Dependas en kia mondo lin metas la naskiĝo."

Vortoj de Carlyle, kiuj trafe ĉirkaŭskribas la eminentan homon. Ekzamenue ĝis kia grado la Majstro respondas je tiu ĉi difino. *Hans Jakob*



D.W.

desegnis Dragutin Wranka

La baniĝanto : Aŭskultu, s-ano Napkap ! Per la hakilo mi engravuris en la glacio utilan demandan frazon. Poste mi dishakis la tekston en pecojn, kiuj nun kuŝas antaŭ vi. Kunmetu ilin, kaj vi scios kian frazon mi engravuris.

Dum vi divenas, mi tie ĉi agrable moderigos mian ardon.

Solve sur paĝo 335

KIAM la 16-an de novembro S-ro **C. C. Goldsmith** emeritiĝis, ĉeestis en la Centra Oficejo nia Vicprezidanto, S-ro Kennedy, por— en la nomo de la Estraro kaj de la Asocio — prezenti dankon por la sindono kaj senlaca penado dum pasinto.

Preskaŭ 20 jarojn S-ro Goldsmith estis nia ĝenerala sekretario. Dum tiu tempo li estis nia “koboldo”. Mi diras “koboldo” ne nur pro lia malalta staturo (kiu igis eĉ liajn infanojn nomi lin “Tiny” = “Etulo”), sed aparte ĉar li kiel vera koboldo prizorgis nian Asocion. Kelkfoje, ekz. antaŭ kaj dum la mondmilito, la situacio por nia Asocio estis vere kriza, sed ĉiam li trovis taŭgajn solvojn, kaj ĉiam liaj raportoj finiĝis per la vortoj: “Tamen estas pli bone ol mi esperis!”

Dum la pasintaj jaroj mi kiel Prezidanto, kaj antaŭ mi Generalo Bastien, en konstanta kunlaboro kun li konstatis lian amon al Esperanto kaj al nia Asocio. Realisma, li ĉiam trovis taŭgajn solvojn en embarasaj situacioj; laborema, li ĉiam akurate plenumis siajn devojn. Li ĉiam havis antaŭ si la principon: “Do it now” = “Faru tion nun”.



Pro sia ĝentileco, laboremo kaj akurateco li akiris lokon en la koro ne nur de la Prezidanto kaj de la Estraro sed ankaŭ en la koro de ĉiuj membroj de nia Asocio. Kaj kiam li nun forlasas la aktivan agadon kiel ĉefo de nia Centra Oficejo, ni ĉiuj dankas lin pro lia vivlonga deĵoro en la servo de la Esperanto-movado, kaj samtempe ni tutkore deziras al li feliĉan “otium cum dignitate”.

E. Malmgren
Prezidanto de U.E.A.

Okazos **Internacia Junularkunveno** en Baden-Baden, 26.12.54–1.1.55, havonta la karakteron de kultura kaj socialpolitika laborkunveno dediĉota al pliprofundigo de la scio pri aktualaj ĉirilataj problemoj en la devenlandoj de la partoprenantoj. Samtempe okazos la ĉijara *Internacia Konferenco de Esperantistaj Studentoj kaj Altlernejoj (I.K.E.S.A.)*

La programo de tiu duobla kunveno ampleksos prelegojn, diskutojn, fest-

vesperojn kaj ekskursojn en kaj ĉirkaŭ Baden-Baden. La kunveno okazos en la “Germana Esperanto-Hejmo”, Haus Agnes, Baden-Baden, Werderstrasse 14. Pro ŝtata subvencio la partoprenkostoj estos nur DM 30, kaj ene de Germanujo la partoprenantoj ĝuos 50%-an fervojan rabaton.

Oni anoncu sin tuj al Esperanto-Jugend Baden, KONSTANZ, Grüngang 8.



Tra la Mondo Esperantista



Svedujo

Nova sukceso en Frostavallen 1954

En aŭgusto Sveda Somera Semajno denove prezentis altekvalitan kultur-semajnon antaŭ tutplena hotelo : 100 partoprenantoj el 13 landoj. La ĉefa prelegtemaro estis “Internacia kultur-interŝanĝo” kaj kune kun la Sveda Esperanto-Instituto invitis la Sveda UNESKO-Konsilantaro kaj la Sveda Instituto por kultura interŝanĝo kun eksterlando.

Profesoro Ivo Lapenna prezentis en serio da prelegoj brilan skizon pri la Eŭropa Konsilantaro kaj la Ideo de Eŭropa Federacio, tre aktuala temo ĝuste nun, kiam la koncerna organizaĵo diskutas la lingvajn problemojn. Docento Sigismundo Pragano majstre pruvis, ke vere ekzistas kulturaj perloj en la originala Esperanto-literaturo, se la esperantistoj nur volas serĉi ilin. Doktoro Ferenc Szilágyi elektis serion pri “Spertoj, komparoj kaj instruoj” kaj donis vere interesajn gutetojn pri la ĉiutaga vivo, kiun li spertis dank’ al korespondado kursa laŭ tute nova metodo. La kvara, licenciato Tibor Sekelj, bedaŭrinde ne povis veni de Ameriko. Lin anstataŭis S-ro Roland Dupuis pere de la temaro “La universaleco de la muziko”, kaj je la ĝuo de la ĉeestantoj li donis pruvon pri sia lerteco.

La kadro de la semajno enhavis ankaŭ ekskursojn, kabaredon, dancon, vesperajn ludojn, filmprezentadojn,

lumbildmontradon, prelegon de Prof. Lapenna pri UNESKO (en Malmö, ripetita ankaŭ en Gotenburgo kaj Stokholmo) k.t.p., kaj ĉio formis bonan kaj enhavoriĉan semajnon. La Sveda UNESKO-Konsilantaro estas informita pri ĉiuj detaloj, kaj la prelegoj pri la Eŭropa Konsilantaro vekis atenton en diversaj nacioj pere de niaj cirkuleroj kaj informiloj pri la semajno.

La sveda ŝtato favoris la aranĝon kaj donis subvencion, dank’ al kiu estis eble doni repagon de certa parto de la vojaĝkostoj al la eksterlandaj partoprenintoj.

Entute digna, altekvalita aranĝo en bela, ĉarma loko. Sendube modelo por ekz. UNESKO mem aranĝi en diversaj partoj de la mondo similajn semajnojn helpe de Esperanto.

Brita Artfesto

En 1904 fondiĝis la Brita Esperanto-Asocio, kaj honore al la 50-a datreveno la Asocio okazigis Art-Feston, kiu kulminis en granda dutaga kunveno en Birmingham. La artajn konkursojn—muzika komponado, desegno k.t.p., kaj la literaturajn konkursojn—eseo, traduko, originala poezio—oni prijuĝis antaŭ ol komenciĝis la Festo, sed la parolajn konkursojn — deklamado, kantado por solistoj kaj por ĥoroj, oratorado kaj teatraĵoj—prezentiĝis kaj estis prijuĝataj antaŭ la publiko ĉe la kunveno mem. La Londona Klubo superis la aliajn kvar trupojn

per verva prezento de la teatraĵo "Dimanĉo kostas kvin pesojn" (tradukita de S-ino Rapley), sed la Bristola Klubo certe meritis laŭdon pro kuraĝa prezento de ĉerpaĵo el "Ifigenio en Taŭrido". Entute 176 personoj konkursis. La tuta sekcio de deklamo temis pri malvaste limigitaj pecoj deklamotaj (la sola poemo aŭdebla estis La Vojo!), sed kie la aranĝintoj lasis pli longan bridon, la talento kaj iniciatemo de la anoj tion rekompencis per bon-nivelaj konkursaĵoj.

Eseo=Mallonga literatura verko, en kiu la aŭtoro ne intencas funde pritrakti sian temon.

ESPERANTISTA VIVO

Naskiĝo

Ferraz-Arrondo. Al Ges. Ferraz-Arrondo, de Mollerusa (Lérída), Hispanujo, naskiĝis filineto Jasmeno la 12-an de Aŭgusto.

Geedziĝoj

Chrobok-Feist. La 23-an de Oktobro F-ino Maria Chrobok, esperantistino, kun D-ro Emil Feist, delegito por Bayreuth.

De Ketelaere-Tytgat. F-ino Paula de Ketelaere, filino de estinta ĉef-delegito M. de Ketelaere, kun S-ro Carlos Tytgat en Antverpeno.

Kolbeins-Ragnarsson. La 25-an de Septembro F-ino Thorey Mjallhvit Kolbeins, filino de Pastro Halldor Kolbeins, prezidanto de Federacio de Islandaj Esperantistoj, kun stud. mag. Baldur Ragnarsson. Ilia hejmo estas en Kleifarvegur 7, Reykjavik, Islando.



KIEL nova ĝenerala sekretario (kaj post eventuala akcepto de la nova statuto kiel administranto) funkcios S-ro John C. Rapley, laŭ decido de la Estraro.

S-ro Rapley depost 1951 laboras kiel oficisto de nia Centra Oficejo kaj do jam estas bone al kutimiĝinta je la laboroj tie. Esperantisto de la jaro 1944, li montris sian intereson al nia movado i.a. per aktiveco en la Londona Klubo kiel ankaŭ en la Brita Asocio. Ni bonvenigas nian novan, junan ĉefon de la Centra Oficejo.

E. Malmgren,
Prezidanto de U.E.A.

Depeŝo el Montevideo

La Plenumkomitato de UNESKO decidis per ĉiuj voĉoj kontraŭ 2 rekomendi al la Ĝenerala Konferenco la akcepton de U.E.A. kun konsulta pozicio, laŭ lastmomenta informo de D-ro Lapenna, nia Observanto ĉe la Konferenco.

Esperanto en Lernejoj

LA lasta enketo pri la instruado de Esperanto en lernejoj, farita de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj en kunlaboro kun UEA okazis en la jaro 1951; la listo estis publikigita en la Dua Parto de la Jarlibro de UEA 1951.

Mi konservis kartaron kun ĉiuj eroj kaj de tiu tempo aldonis kaj forstrekis nomojn, por ke la listo estu ĝisdata. Pro manko de regula informado tiu listo certe ne estas nun fidinda.

Unu el la celoj de ILEI estas servi kiel centra informejo. Mi havas la impreson (espereble malĝustan), ke malpli da lernejoj nuntempe havas kursojn, ol en 1950-51. Pere de reprezentantoj de ILEI mi ricevis en 1954 nomojn de lernejoj, kie Esperanto estas nun instruata, sed ne ĉiuj reprezentantoj kolektis tiujn novaĵojn; ankaŭ estas instruistoj, kiuj ne havas kontakton kun niaj reprezentantoj aŭ kun organizita instruista grupo. Mi do petas, ke ĉiu instruisto, kiu ne sendis informojn dum la pasinta jaro, bonvole sendu al mi poŝtkarton, kun nomo de lernejo, aĝo, sekso, nombro de lernantoj kaj horoj de la instruado ĉu en aŭ ekster la lerneja temaro.

Elstara trajto de la kunvenoj de ILEI en Haarlem estis la diverseco de la lernejoj reprezentitaj tie: de infanlernejo ĝis gimnazio, porinstruistaj seminarioj, profesiaj lernejoj, lernejoj por duonvidantoj kaj blinduloj, por subnormalaj infanoj, por tiuj en hospitalo. Specialistoj

pri la arto kaj la muziko ankaŭ ĉeestis. Malfacile estas elekti temojn pedagogiajn, kiuj instigos al profitdona diskutado, sed ni ja havas eksterordinare riĉan materialon ĉe ni. Mi treege ĝojos ricevi proponojn por venontaj kunvenoj. Artikolojn mi ankaŭ bonvenigos por la sekcio de ILEI en "Esperanto et Culture" dum decembro kaj majo. Oni devas nun mendi la decembran numeron kun plenaj raportoj pri la kunvenoj en Haarlem de S-ro Dumarquez, Anzin St. Aubin, par Arras (P. de C.), Francujo, aldonante du respondkuponojn.

Por realigi nian celon, ke Esperanto estu viva kaj konstrua faktoro en la faka kaj lerneja vivo, oni ja bezonas interŝanĝojn per korespondado. La koresponda centro de ILEI ne estas tiel uzata, kiel ni deziras. Ni kuraĝas proponi, ke oni sendu petojn anticipe, kun plenaj detaloj pri bezonoj kaj unu respondkuponon en decembro kaj januaro, al la sekretario, F-ino E. W. Tegg, 258 Victoria Road, Ruislip, Middlesex, Anglujo. Kompreneble oni ĉiam estas preta akcepti petojn, sed se multaj venos samtempe, pli facile estas kontentigi la petojn.

Ni, geinstruistoj, ja havas la eblecon fari instruistan komunumon, el kiu povus kreski grandega kontribuaĵo al internacia edukado kaj al mondkompreniĝo.

V. C. Nixon,
Prezidantino de ILEI,
183 Woodlands Park Road,
Birmingham 30, Anglujo.

NIA LITERATURO

POST apero de la grava kaj pensiga artikolo de Prof. Lapenna: “Krizo de nia literaturo” (marto 1953) sekvis en *Esperanto* du polemikaĵoj de S-ro Wagner, kiuj, se ili reprezentas iom vastan koncepton inter la esperantistoj (aperis nur unu refuto), montras ke vere nia literaturo troviĝas en krizo kaj ke estas urĝe necese ke Prof. Lapenna kaj aliaj “senŝargigu sian menson” (kiel ĝentile diras S-ro W.)*

“Nia celo estas fari novajn esperantistojn”. Sendube jes. Sed tio ne estas ĉio, nur unu el la flankoj de nia strebado. De jaro al jaro ni “faras” konsiderinde grandan amason da novaj esperantistoj, kaj se ni havus la eblon vidi statistikon, la nombro certe mirigus nin. Sed bedaŭrinde nur tre malgranda procento de tiuj novaj esperantistoj atingas kaj superas la nivelon, kiu permesas legon de libroj, “en kiuj troviĝas la kutima ĉiutaga parollingvo”, kvankam nia literaturo jam de longe posedas abundon da eldonaĵoj ĝuste por tiu nivelo. Do ne manko de tia literaturo malhelpas nian progreson. Inter tiu malgranda procento, kiu post kurso aliĝas al nia movado, oni trovas la idealistojn, tiujn kiuj estas kaptitaj de la granda penso de la kreinto de nia lingvo kaj kiuj estas pretaj dediĉi laborforton kaj monon por efektiviĝi nian movadon. La oferemo kaj fideleco de tiuj homoj ĝis nun estas sango de niaj organizaĵoj, la sola bazo de la movado. Fakte, kiam ni invitas homon al kurso en esperanto, ni invitas al laboro kaj ofero por idealista movado. La

efektive praktikaj uzoj por seriozaj celoj estas tre limigitaj.

La mondo urĝe bezonas esperanton hodiaŭ, morgaŭ. Sed en nia fera mondo idealismo ne sufiĉas por efektiviĝi nian ideon. Ni devas rekoni ke la granda amaso de la homoj estas egoistoj, kaj sur tiu egoismo ni vole aŭ nevole devas bazi nian agadon. Ne pli ol unu el cent homoj, kun kiuj mi parolis pri esperanto, akceptis la ideon kiel idealisto. La relative malmultajn idealistojn de la mondo, nia afero devas dividi kun sennombraj aliaj idealistaj kaj homaranismaj movadoj. La naŭdek naŭ ceteraj unue demandas: Ĉu mi havus utilon de tiu lingvo? Ĉu troviĝas fakaj verkoj sciencaj, teknikaj por mi en esperanto? Ĉu mi povus atingi gravajn belliteraturajn verkojn en esperanto? Jen respondas S-ro W.: “Se vi deziras studi sciencon, vi povas tion fari pli facile en via nacilingvo” (!). Jam antaŭ ol mi vidis la subskribon de la artikoleto, mi pensis: certe, jen ano de iu pli granda lingvosocieto, kompreneble, ĉar tiel simple la afero aspektas al ili. Sed kiel aspektas la sama afero por ano de unu el la relative multaj malgrandaj lingvosocietoj? Kiel por turko, dano, finno, jugoslavo? Por tiuj la demando estas: kiun lingvon lerni, esperanton, anglan, rusan k.t.p.? Oni nun devas lerni almenaŭ du (ofte pli) naciajn lingvajn por informi sin pri la aktualaj verkoj sciencaj aŭ teknikaj, kaj tamen oni sentas la mankon, se aperas grava verko en lingvo de li ne regata.

Se mi estus norvega edukiĝema botanikisto kiu decidus kun pure eduka celo tuja kaj praktika, lerni

* Ĉiuj citaĵoj el *Esperanto*, junio 1953, p. 192 kaj junio 1954 p. 173.

unu novan lingvon fremdan kaj povus elekti inter esperanto kaj grava nacia lingvo, mi elektus la lastan. Alie mi estus frenezeta ! Kiom ajn la esperanta propagandisto parolus pri streĉaj detektivromanoj kaj dolĉaj amnoveloj, mi supoze petus lin iri al la infero kun ili, ĉar da tiaj ni havas abunde en norvega lingvo, eĉ tre malkaraj.

Sed se la sama propagandisto povus logi per gravaj verkoj botanikaj, belliteraturaj k.s., la afero tuj aspektus alie, ĉar se mi per lerno de unu lingvo povus informiĝi pri botanikaj aktualaĵoj el pluraj landoj, mia favoro supoze kliniĝus iom al la internacia lingvo, kaj ju pli da verkoj kaj periodaĵoj li povus montri al mi, des pli ĝi altirus mian egoistan botanikan memon. Mi sendube tiam elektus esperanton. Alie mi estus frenezeta !

El tiu vidpunkto estas absurde diri kiel S-ro W. : “Kiam sufiĉe da scienculoj fariĝos Esperantistoj por postuli sciencon literaturon, ni eldonu ĝin por ili. Intertempe donu al ni librojn, kiujn Johano kaj Mario ŝatus legi, kaj per kiuj ili lernos babili Esperanton.” Tio ja estas starigi la aferon sur la kapo ! Valora literaturo ja estas la sola efektiva rimedo por altiri la (se pri homaranismo indiferentajn) scienculojn, teknikistojn, literaturistojn k.t.p. al nia movado. “Kiam ajn ekzistas sufiĉe da postulo por povigi la eldonon, sen financa malgajno, de libro pri iu ajn scienco,” tiam nia fina venko estos jam realeco ! Tiam nia hodiaŭa problemo ne plu ekzistos, kaj nia movado ne plu postulos oferon nek de S-ro W. nek de iu alia, ĉar, fidu, tiam la grandaj eldonejoj estos pretaj eldoni tiajn verkojn originale en Esperanto, kaj ĉiu scienculo, kiu

deziras informiĝi pri sia fako, devas lerni esperanton. Alivorte : nia batalo finiĝis, kaj la mondo jam ĝuos la fruktojn de la penoj kaj la oferoj de la pioniroj de nia movado.

Sed—ni ankoraŭ havas pecon da vojo antaŭ ni. Ankoraŭ nia afero postulas oferon de siaj adeptoj. Nun la nefuĝebla problemo kaj solvota tasko estas : Kiel ebligi la esperantajn eldonejojn flanke de facila legaĵo ankaŭ eldoni gravajn sciencajn, fakajn, belliteraturajn verkojn ? La solvo estas tre simpla, sed eble iom teda kaj banala : La esperantistoj devas aŭ aĉeti gravajn pezajn verkojn, kiujn ili eble neniam povos trapenetri, aŭ ili devas aĉeti la pli facilan literaturon en tia kvanto, ke la eldonejoj per tiaj verkoj povos kovri la deficiton de la pli gravaj verkoj. Alia eblo ne ekzistas, se ne iu milionulo aŭ riĉa institucio ekhavis la ideon subvencii eldonon de gravaj verkoj en Esperanto.

Hodiaŭ eldono de iom pli valora verko postulas grandan optimismon de la eldonisto kaj certe ne donos multan dividendon en la plej proksima tempo, sed nur tiu vojo kondukas al la celo. Nur per interŝanĝo de scienco kaj kulturo nia afero venkos, ne per *Ĝisrevido !* kaj *Poŝtmarkojn bildflanke !* Hodiaŭ nia afero staras antaŭ grava ekzamenigo. Sukceso aŭ malsukceso en Montevideo dependos de la vizaĝo, kiun ni povos montri al la mondo. La vizaĝo de lingvo estas ĝia literaturo. Kiom multe pli forta starus niaj reprezentantoj en Montevideo, se ili povus kunporti plenbrakon da freŝe eldonitaj gravaj verkoj, eĉ se la tuta eldonkvanto de tiuj verkoj ankoraŭ kuŝus nevendita ĉe la eldonisto !

E. A. Haugen, Norvegujo



Nia Forumo

PAROLAS LA LEGANTOJ

Korespondantoj nepre esprimu sin koncize kaj mallonge. Antaŭ ol sendi leteron por publikigo kontrolu la longon per komparo kun jam presita teksto.

Presigo de letero de korespondanto ne necese signifas ke U.E.A. oficiale subtenas la esprimitajn opiniojn.

Pri nova metodo por fruktkulturado

En *Esperanto* de Junio 1954, aperis artikolo de S-ro Gudrun Johnson pri la nova metodo de fruktkulturado de franco, S-ro Bouché-Thomas.

Ĉar tiu fruktkulturisto loĝas en mia urbo, mi prezentis al li la artikolon kaj la tradukon.

Por la fakuloj, li atentigis min pri kelkaj precizigoj :

La tero devas esti fosita laŭ la kutima maniero, kun nur la bezonataj truoj por enmeti la plantojn.

Jenfaktela rekomenditaj distancoj :
(La unua cifero estas la disspaco inter la vicoj, la dua estas tiu inter la plantoj en sama vico) :

Pirarboj 2m. 50 2m.

Pomarboj 3m. 50 ĝis 4m. 3m.

S-ro Bouché-Thomas, kiu loĝas : 14, rue La Fontaine, Angers (Maine-et-Loire), Francujo, vendas dikan libron pri sia metodo (*franclingve*).

Kompreneble la esperantistoj de Angers estos ĉiam pretaj aranĝi viziton al la bieno de S-ro Bouché-Thomas por fakuloj esperantistaj aŭ gvidataj de esperantistoj (atentu, ke Angers situas je nur 40 km. de la Esperanto-Kulturdomo, kastelo de Grésillon, Baugé). Cetere la studvojaĝoj, pere de esperanto, devus malfermi al nia movado vastajn perspektivojn.

A. Frangeul,
Angers Vicdelegito de U.E.A.

Ĉu sovjet ? aŭ sovet ?

El urbo Tripoli, Libio, samideano 77-jaraĝa kiu ne deziras ke lia nomo estu konigata, skribas jenon :

Kiam oni skribas Esperante fremdan vorton, oni devas ĝin literumi konservante kiel eble plej nealiigita la originan fonetikon. Laŭ tiu ĉi grava fundamenta regulo oni devas diri kaj skribi "sovjeto", "sovjetano" k.t.p., kaj ne "soveto". Fakte dum longa tempo tiu ĉi regulo estis rigore observita kaj oni trovas en bonaj vortaroj (Fulcher-Long, Millidge, Bennemann), la formon "sovjet'" kaj ne "sovet' ". Sed lastatempe pli kaj pli mi renkontas "sovet'" eĉ en skribaĵoj verkitaj de eminentuloj. Eble iu komencis erari kaj aliaj imitis, kredante ke "sovet'" estas aprobita nova formo, kvankam ĝi kontraŭas al la supre citita fundamenta regulo, kiu, male, estas plene efikanta.

La skribinto ŝajne ne rimarkis, ke la formo registrita en la Plena Vortaro (pro sia internacia komuneco la plej influa Esperanta vortaro) estas "soveto". Tiu formo ne estas (kiel ĉe aliaj vortaroj, kiujn li citas) formo proponita, sed formo kiu registras la vastan uziĝon de tiu vorto post 1920. Ĝis proks. 1933 la sovetia Esperanta movado estis kredeble la plej grandskala kaj energia en la mondo, kaj la rusoj uzadis ĉiam nur la formojn soveto,

fino sur paĝo 337

40-a Universala Kongreso de Esperanto

30.VII—6.VIII, 1955, Bolonjo, Italujo

N-ro 1

O F I C I A L A K O M U N I K O

Decembro 1954

Adreso : Oni adresu ĉiujn korespondaĵojn por la kongreso al : 40-a Universala Kongreso de Esperanto, ĉe CIT, Piazza Nettuno 2, BOLOGNA, Italujo.

Banko : La kongresa banko estas : Banco di Napoli Bologna, konto 2824.

Poŝtĝirkonto : Esperanto-grupo "A. Tellini", Piazza Medaglie d'Oro 3, konto N. 8/20620 Bologna.

Pagoj : Pagojn oni povas fari al la Oficialaj Perantoj de la kongreso (vidu la Unuan Bultenon) al kiuj sendu ankaŭ la aliĝilojn. Ne sendu aliĝilojn al L.K.K. kaj pagon al alia instanco.

Aliĝado : Aliĝilojn kaj bultenojn oni povas ricevi de la Landaj Asocioj de UEA, de UEA mem en Anglujo kaj de la kongresa oficejo en Bolonjo. Estas konsilinde frue aliĝi por ĉi tiu, la *Jubilea* kongreso. Valoras atentigi, ke la kotizo altiĝas post la fino de decembro. La regulo pri rifuzo de aliĝoj post junio validas ankaŭ por la nuna kongreso.

Kondiĉoj en Bolonjo : Aŭdiĝis esprimoj de antaŭtimo pri granda varmo en la kongresa urbo. Tial L.K.K. avizas, ke ĝi konsideras la aranĝon de eksterdomaj prezentoj dum la kongreso. Krome ĝi antaŭvidas, ke la kunvenoj de la kongreso okazos pli frue ol kutime por eviti la posttagmezan varmon. Por ordinara vizitado en la urbo, la famaj portikoj en ĉiuj stratoj donas bonan ŝirmon dum piedirado sur la trotuaroj. La situacio pri hoteloj kaj pensionoj estas tre bona. Bonvolu noti (precipe karavan-organizantoj) ke oni devas

sin turni al CIT pri loĝejoj ĉar tiu instanco havas solrajtojn por la kongresa semajno. Detalaj informoj estos en la Dua Bulteno kiu aperos en januaro.

Novaj Perantoj : Belgujo (Flandra Ligo Esp.) : F-ino J. Terrijn, Raapstraat 74, GENT. Nederlando : Nederlandse Esperantisten-Vereniging, Stadionkade 6, Amsterdam. Poŝtkontnumero 34563. Norvegujo : F-ino V. Birkevold, Hjelmelandsgt. 77, STAVANGER. Svislando : S-ro W. Laederach, Klingenmatt 31, ZURICH 55 : Poŝtkonto 33612 : Tel. (051) 33.37.31.

Jubilea Glumarko : La L.K.K. eldonas belan glumarkon kun ora surpriso. Prezo por folio de 20 markoj—1 respondkupono, 50 liroj, 6 pencoj. Mendeblaj pere de perantoj al kiuj pagu. Nepre mendu grandkvante ĉi tiun belegan jubilean markon !

Nova ano de L.K.K. : Alelektita, kiel Helpkasisto : S-ro G. Pompilio.

Lingvo : Bonvolu skribi *nur en Esperanto* (ankaŭ italoj ĉar la K.K.S. estas eksterlandano) pri kongresaj aferoj.

Statistiko (ĝis fino de oktobro) : Argentino 1, Aŭstrio 1, Belgujo 3, Brazilo 3, Britujo 24, Danlando 4, Finnlando 4, Francujo 19 Germanujo 14, Hispanujo 3, Italujo 35, Jugoslavio 10, Nederlando 19, Norvegujo 3, Novzelando 1, Portugalujo 1, Sarlando 1, Svedujo 16, Svislando 7, Usono 1. Sumo 170 el 20 landoj.

Mason Stuttard
Konstanta Sekretario

Bernard Long :

ORA JUBILEO de B.E.A. 1904-1954

EN la jaro 1904 la Esperanta movado estis tre juna en Britujo, sed rapide kreskis pro la entuziasmo kaj praktikaj metodoj de pluraj ardaj pioniroj kiuj jam en 1903 fondis la Londonan Klubon kaj pere de tiu centro kolektis novajn samideanojn tra la tuta lando. Baldaŭ montriĝis ke la Klubo mem ne povos taŭge funkcii kiel tutlanda societo, kaj ĝiaj gvidantoj decidis fondi nacian asocion, kiu akceptos membrojn de ie ajn, filiigos lokajn grupojn, eldonos kaj vendos lernolibrojn kaj aliajn verkojn, provizos propagandilojn, kaj reprezentos la movadon antaŭ la publiko.

Mi povas mencii ĉi tie du el la ĉefaj pioniroj koncernitaj en la entrepreno, nome la juna borsisto H. B. Mudie kaj la tiam tre konata publicisto kaj redaktoro W. T. Stead. Ambaŭ malavare helpis la movadon en pluraj manieroj, kaj dum Mudie fariĝis sperta parolanto kaj verkanto en la lingvo, Stead reklamis ĝin en siaj vaste legataj eldonaĵoj. Mudie mortis en 1916 dum milita deĵoro en Francujo (ne en batalo, sed pro aŭtomobil-trajna kolizio), kaj Stead dronis en la terura pereco de la ŝipego *Titanic*, en 1912, survoje al Usono. Veraj tragedioj por nia afero, precipe en tiuj fruaj jaroj !

De la komenco la Asocio havis propran sidejon en Londono, kaj salajratajn oficistojn. En 1907 la Asocio jam tiel bone establiĝis kaj progresis, ke estis decidite registri ĝin laŭleĝe kaj tiel doni al ĝi taŭgan oficialan pozicion. Por tiu celo necesis baza leĝa konstitucio, kiu validis ĝis nun kaj daŭre validos. Grava punkto en tiu dokumento estas deklaro ke la Asocio ekzistas por

disvastigi la lingvon de Zamenhof: sekve ĝi neniel rajtus propagandi iajn aliajn idiomojn, kaj eĉ se la Idoskismo de 1907 estus altirinta multajn anojn de la Asocio (kio fakte ne okazis) ili ne estus povintaj utiligi ĝin por siaj celoj.

La Asocio multe profitis diversmaniere pro la okazigo de la Tria Universala Kongreso en 1907 en la universitata urbo Cambridge. La ĉefa organizanto estis la nelacigebla Mudie, sed elstara tiurilate estis ankaŭ la unua Prezidento* de la Asocio, Kol. John Pollen (kiu tenis tiun oficon ĝis 1912). Pollen estis sperta parolanto kaj verkanto en la lingvo, kaj arda propagandisto ĝis sia morto en 1923. Diversaj gvidantoj kaj helpantoj de la Asocio partoprenis la organizon de kvar pluaj Universalaj Kongresoj en Britujo, nome tiuj de Edinburgh (1926), Oxford (1930), London (1938) kaj Bournemouth (1949).

Britaj Naciaj Kongresoj komenciĝis en 1908, kiam la samideanoj en Edinburgh organizis la unuan tian feston, kaj de tiam ili okazis en multaj diversaj urboj.


La oficiala organo de la Asocio, *The British Esperantist*, aperis regule de la komenco. Dum certaj periodoj la Asocio eldonis gazeton por studentoj de la lingvo, *The Esperanto Monthly*, kaj propagandan gazeton *International Language*, plejparte anglalingva: sed ambaŭ montriĝis

* Mi opinias ke kiam temas pri formala titolo, ĉi tiu malnova sed malofte uzata formo estas pli taŭga ol Prezid-anto. Ĝi estas internacia, kaj samspeca kun titoloj kiel Rezidento kaj Regento.—B.L.

Interesa Konkurso

por la festotagoj de la monato

speciale aranĝita de la Prezidanto de U.E.A.



			D				O	 poentoj
			E				O	 poentoj
			C				O	 poentoj
			E				O	 poentoj
			M				O	 poentoj
			B				O	 poentoj
			R				O	 poentoj
			O				O	 poentoj
Sume								 poentoj

Nun ni prezentas novan specon de konkurso. Kaj ni esperas, ke ĝi estos amuza kaj samtempe instrua. Tamen gardu vin, ĉar ĝi povas esti ĝena kiel pikanta kulo.

Interne de la supra kadro troviĝas loko por 8 horizontalaj vortoj, se ĉiu vorto enhavas 8 literojn. Ĉiu vorto devas esti substantivo, kaj estas permesataj nur tiuj, kiuj troviĝas en Plena Vortaro (ne en la Aldono de Plena Vortaro, ĉar ankoraŭ ne multaj posedas ĝin). Ĉiu litero je la unua

apero ricevas valoron de 1 poento. Je ripeta apero de la sama litero la valoro plialtiĝas ĉiam je unu poento.

Ekzemplo: Imagu ke vi elektas la vorton KVADRATO. La unua K donas 1 poenton, V=1 poenton, A=1 poenton, D=1 poenton, R=1 poenton, A=2 poentojn, T=1 poenton kaj O=1 poenton. Se la venonta vorto estus ekz. ARSENALO, la poentciferoj estas: A=3, R=2, S=1, E=1, N=1, A=4, L=1 kaj O=2 poentoj. K.t.p.

Kiu atingos la plej altan poentsumon gajnos la **Unuan premion**: Libroj laŭ propra elekto je valoro de maks. 50 anglaj ŝilingoj (aŭ Senpaga membreco kiel Membro-Subtenanto de UEA por 1955 kaj krome libroj je valoro de 25 ŝilingoj). **Dua premio**: Libroj je valoro de 25 ŝilingoj. **Tria—Kvina premioj**: Libroj je valoro de 10 ŝilingoj.

Via solvo devas atingi nin antaŭ 15 februaro. (Ekstereŭropanoj sendu per Aerogramo). Bonvolu adresi vian solvon: **ESPERANTO, Festtaga Konkurso, Tegelbacken, Stockholm, Svedlando**. Kaj en la maldekstra angulo de la koverto skribu la sumon de la poentoj atingitaj, ekz.: "Sume 280 poentoj".

Agrablajn festotagojn deziras al vi

La Prezidanto de U.E.A.



Ora Jubileo de B.E.A., *fino*.


tro kostaj kaj fine devis ĉesi. Ĝis nun la financaj cirkonstancoj ne permesis restarigi detiaj entreprenoj.

Ne estas eble ĉi tie detali tiun kaj aliajn metodojn de propagando uzatajn de la Asocio, sed mi devas menciigi speciale unu metodon, kiu sukcese daŭris dum longa periodo (kaj ankoraŭ daŭras), dank' al la elstara kapablo por tia laboro de S-ro M. C. Butler, iama Sekretario kaj poste Eduka Sekretario de la Asocio. Tio estas, rekta propagando inter geknaboj (kaj ofte ankaŭ iliaj instruistoj) pere de demonstraĵoj lecionoj en la lernejoj. Ofte oni kolektas centojn da lernantoj por unu sola leciono tiuspeca, kaj dum longa periodo S-ro Butler tiel propagandis ĉiujare al miloj da ili. Li kutime kunprenas simplajn malkarajn lernolibretojn por disvendo post la leciono, kaj tre granda kvanto estas aĉetita de la geknaboj.

En 1939, post kelkjara kolektado de mono laŭ iniciato kaj instigo de S-ro C. C. Goldsmith, la Asocio akiris propran domon en Londono. Tiurilate mi mencias, ke B.E.A. ĉiam devis dependi, por sia solventeco, de senkondiĉaj donacoj, testamentaĵoj kaj specialaj alvokoj (ĉiam varme responditaj), ĉar nur parto de la Esperantistaro en la lando (eĉ de grupanoj) fakte kotizas.

La Asocio posedas bonegan Bibliotekon, kiun prizorgas kaj sisteme klasifas S-ro M. C. Butler, kiu tiukiale meritas sinceran dankon de la tuta movado, ĉar la biblioteko estas unu el la plej ampleksaj en la Esperantista mondo.

La Asocio signis sian Jubileon per la organizo de tutlanda Artfesto, kiu bone sukcesis kaj kies finaj konkursoj prezentiĝis en la urbo Birmingham frue en novembro; kaj per monokolekto por speciala Jubilea Kaso, al kiu ĝis la fino de oktobro kontribuiĝis £700 el la celata sumo £1000.



Enigma Konkurso N-ro 93

Solvojn oni sendu al S-ro P. H. Mooy, 89 Av. du Sacré Coeur, Brussel-Jette, Belgujo. Por ĉiu tute korekta solvo oni kutime donas 5 poentojn. Ĉiufoje la tri personoj, kiuj havas la plej altajn poentnombrojn, gajnas premion. Ĉiu MA de UEA kun la sama ŝanco povas komenci la sendon de la solvoj je kiu ajn momento. Limtempo por Eŭropo estas du monatoj.

Pliaj informoj, se dezirataj, riceveblaj de S-ro Mooy kontraŭ unu respond-kupono internacia.

Enigmo
N-ro 211
ĈIFRA
SKRIBO

```

      |.|.|.|.|.} ≠ 1 |.|.|.|.|.|.|.|.|.|.|.| | | | |
| | ≠ 4 |.|.|.|.|.|.|.|.|.|.|.|.|.|.|.|.|
|.|.|.|.|.|.|.|.|.|.|.|.|.|.|.|.|.|.|.|.|
|.|.|.|.|.|.|.|.|.|.|.|.|.|.|.|.|.|.|.|.|

```

La ĉi-supraj misteraj signoj enhavas kelkajn vortojn, kiuj koncernas la proksimiĝantajn festotagojn. Vi bonvolu deĉifri tion. La solvo estas absolute ne kaprompa kaj eĉ tre simpla. (Solvo *sur paĝo 338*.)

Enigmo N-ro 212: La tuto konsistas el 146 literoj kaj formas du strofojn el poeziaĵo de konata aŭtoro, pri kio mi devis pensi, legante lian lastan kor-elverŝon, kiun la redakcio antaŭ nelonge publikigis. La komencliteroj de la ŝlosilvortoj formas en la donita sinsekvo esprimon el la Proverbaro. 59-24-116-136-26 seka bruado de krevado: 28-75-4-45-110 ŝirmita kontraŭ infekta malsano; 131-67-98-51-141 profite uzebla; 80-42-138-48-90 korda muzikilo; 35-114-145-77-106 ĉiela korpo; 32-73-34-71-125 poeziaĵo; 31-10-93-29-63 nutraĵo por ĉevaloj; 12-112-15-129-44 bestloĝejo; 76-70-123-87-6 senferdeka ŝipeto; 128-115-88-37-17 kapoparto; 104-38-108-39-119 kredema kiel infano; 66-

99-46-143-64 longkrura birdo; 126-101-55-107-23 ĝin uzas ĉarpentisto; 5-81-30-105-63 oni ekstraktas petrolon el ĝi; 9-92-40-53-139 malrapide (muziko); 18-116-140-89-122 nediafana juvelŝtono; 43-60-142-124-47 pendanta frakparto; 83-100-2-27-33 servas por rigidigi tolaĵon; 135-9-72-121-95 skrapo por dispecetigi; 74-132-109-85-146 familiano; 79-131-19-1-17 frukto; 8-86-21-94-54 naturfenomeno; 11-16-93-13-23 nukseto; 82-83-133-36-44 flava knedeblo substanco; 96-65-130-62-110 nordpolusa; 84-97-57-69-6 globo; 76-106-91-25-125 larĝkapa metala ŝraŭbo; 78-43-4-120-47 kuglego; 111-95-100-30-128 virina diaĵo de akvoj; 137-117-66-22-74 korta naĝbirdo; 144-103-3-25-68 bestloĝejo; 118-49-20-102-134 publika veturilo; 113-127-67-75-68 malsano de la spirorganoj; 41-52-21-7-14 akiri per favoro de la sorto; 50-120-112-69-33 duklapa molusko; 61-139-56-58-31 absolute necesa.

Solvoj *sur paĝo 338*

C. C. Goldsmith :

La Verkaro de Zamenhof

PRESKAŬ ĉiu instruisto, preskaŭ ĉiu lernolibro kaj preskaŭ ĉiu kompetentulo rekomendas al la Esperantistoj la legadon de la verkoj de D-ro L. L. Zamenhof, la aŭtoro de la lingvo. Bedaŭrinde, tamen, la plimulto de liaj verkoj jam dum longa tempo ne estas akirebla, pro elĉerpiĝo, kaj la malmultaj haveblaj libroj ofte ne estas allogaj pro la daŭra uzo de la malnova literaro kaj malbona papero.

Antaŭ naŭ jaroj oni pripensis la eldonon, iom post iom, de la verkoj de Zamenhof en bela kaj bone presita uniforma eldono. La projekto estis diskutata kun kelkaj aŭtoritatoj kaj speciale kun S-ro William Bailey, L.K., tiu kiu plej detale studis la stilon kaj vortuzadon de la Majstro kaj plej fundamente koniĝis kun la spirito de la lingvo.

Por komenco S-ro Bailey promesis fari notojn pri *Fundamenta Krestomatio*, ĉar kvankam ĝia lingvaĵo ankoraŭ estas belstila kaj plene komprenebla, ĝi en kelkaj rilatoj impresas arkaike. Farinte grandan parton de la laboro, kiu estis tiel simpatia al li, li mortis la 8-an de Aŭgusto 1946. Lia penado ne estas perdita ĉar Pastro W. J. Downes, Akademiano, nun posedas preskaŭ ĉiujn librojn kaj manuskriptojn de S-ro Bailey, kaj li same ame kaj kompreneme finis la laboron.

Por tiu nova eldono de eble la plej grava Esperanta libro S-ino Wanda Zamenhof verkis Enkondukon en Majo nunjara, do nelonge antaŭ sia bedaŭrinda kaj tragika morto. Jen tio, kion ŝi skribis :

“Kun profunda emocio mi skribas ĉi tiujn enkondukajn vortojn.

“Post multaj jaroj . . . la verkoj de nia kara Majstro, jam elĉerpitaj, kiuj tiamaniere estis preskaŭ perditaj por la vasta esperantistaro, denove aperas eĉ en pli bela formo. Ili sendube fariĝos freŝa torento en nia movado.

“Pri tiu okazo, mi kun kortuŝo rememoras la malfacilaĵojn, kiujn devis venki la Majstro antaŭ pli ol sesdek jaroj, eldonante siajn unuajn verkojn. Li devis lukti kontraŭ la malhelpo de la registaro, la indiferenteco de la publiko, fine kontraŭ sia persona financa malbonstato. Li multe suferis, multe batalis, tamen lia neŝancelebla kredo en la justeco de la afero, lia profunda amo al sia verko superis ĉiujn malhelpojn, kaj la unua libro aperis en 1887, kiel tre modesta broŝureto.

“Ĝi estis legata de malgranda aro da amikoj, pioniroj de la nova ideo, kaj fariĝis fundamento de la vasta esperanta literaturo, kiu tra jardekoj konstante pligrandiĝis.

“Malfacila estis la vojo de la esperanta libro ; tamen la plej terura sorto frapis ĝin dum la dua tutmonda milito, kiam, je ordono de Hitler, miloj da esperantaj libroj estis bruligitaj en ĉiuj landoj. La fajro bruligis la librojn, sed ne povis entute detrui ilin ; kaj nun ni estas atestantoj de ilia reviviĝo.

“Mi . . . deziras elkore, ke la *Fundamenta Krestomatio* fariĝu la unua ĉenero en longa vico de aliaj libroj.”

Wanda Zamenhof,
en Majo 1954.

fino sur paĝo 338

Belarta Konkurso 1954 : Traduka Poezio

Dua premio :

El “Anĝelo de l’morto”

J. O. Wallin (1779–1839), tradukis Magda Carlsson.

Vi, Adamidoj, el ter’ devenas
kaj iros reen al sama ter’ !
Vi estas miaj, vi apartenas
post pek’ unua al mortsufer’.

El oriento
mi pren-atingas
al okcidento
kaj vin estingas.

Di-vorton portas mi de la ter’,
de maro, fajro kaj de l’aer’.

Vi nestojn faras pasersimile.
En verda bosko de la printemp’
birdetoj kantis la ĝojon trile
sub kron’ folia en varma temp’.

Sed birdonestoj
kun vent’ batalis
kun pluv’, tempestoj
kaj teren falis.

Ne plu revenis pasinta ĝoj’ . . .
Jam trilis ili por lasta foj’.

Por tag’ morgaŭa vi maltrankvile
kun timo ĝemas kiel kolomb’,
sed sub piedoj, klapokaptile
por vi malfermas sin via tomb’.

Senlunan horon
vi malaperas
kaj la memoron
la temp’ konkeras :

novluno vidas el nubargent’
alvenon—svenon de nova gent’.

Vi ŝvebas flirte en danc-deliro,
en rond’ plezura petolas vi,
kaj floras mirto kaj sonas liro,
sed . . . trans la sojlon enpaŝas mi :

mallaŭtas sono
ĉe l’dancofino,
ekpalas krono
kaj fianĉino . . .

Malĝojo, Skribo instruis nin,
de ĝojo estas la certa fin’.

Mi ĉion regas, ĝis Li estonte,
pli forta, venos en fulmobril’ ;
profunde ŝakte, ŝvebante monte
sibladas mia glacia spir’.

La landosarka
rastilo pesto
kaj la sagarka
ekpafa gesto

viktimojn trafas. En ĉi batal’
ne ŝirmas muroj, nek ŝilda ŝtal’.

Flugilon volvas mi ĉirkaŭ ŝtormon,
marondon rulas al ĝia cel’,
de l’ŝtatsistemoj frakasas formon—
elmane falas tiranmartel’.

Por mi jarcentoj
nur estas horo,
kaj homogentoj
kaj homlaboro

al mi ondadas el vasta mond’,
ĝis fine dormos la lasta ond’.

Mansignas mi, kaj vivantaj krie,
balae flugas al tiu lok',
en kiu nomo ne sonas, kie
ne lang' respondas al via vok'.

Mi plezurvagas—
renversas tronojn,
ensarkofagas
Napoleonojn . . .

Ĵus potenculo kaj suveren'
kaj nun da polvo nur manopren'.

Vi venis . . . iros. Restado gasta.
Vi hejmon havas nur por la nun'.
Vi loĝos poste en lok' malvasta,
en ĝin ne lumas la brila sun' ;

en ĝia pordo
blazon' ekpalas,
en ĝia korto
la jugo falas ;

katen', korligo samkiel kan'
ŝiriĝas tie pro sama man'.

Do, celojn viajn, mortul' esploru,
dezirojn pesu kun sankta tim' !
Man', koro puraj al Li fervoru,
al Kiu nudas la homanim' !

Tra tiu pordo
vi ĉiuj lamos,
sur kiu vorto
eterne flamos,

senŝanĝa vorto de Dio : "Ve,
eniros ĉiu, neniu re !"

Sed Di' vin amas. Ho tima tremo,
do trankviliĝu ! Esperu, kor' !
El la en teron metita semo
ekĝermos bene rikolta or'.

Ho, kion cedis
vi tre dolore,
ho, kion metis
vi tombon plore

ne tie restas, ne iĝis nul',
ĉe li ja estas, ĉe Eternul' !

Niaj mortintoj

Ni kun ĉagreno eksciis pri la forpaso de la jenaj samideanoj, al kies parencoj ni esprimas nian profundan kondolencon.

S-ino Strüby, bopatrino de H. Kürsteiner, Honora Prezidanto de U.E.A., la 2-an de Novembro, 90-jaraĝa, en St. Gallen, Svisujo.

Klajić. En Oktobra numero de nia revuo ni anoncis la 80-jaran datrevenon de naskiĝo de Radomir Klajić, serba pioniro de Esperanto. Nun kun doloro ni ricevis informon, ke li mortis je la 15-a de Oktobro. De 1910 Klajić agis por nia afero, verkis lernolibron en serba lingvo, funkciis kiel delegito en pluraj lokoj serbaj ĝis li fiksiĝis en Beograd kiel Financa Inspektoro Ministeria. Multan dankon ŝuldas al li UEA, precipe en komplika tempo, kiam

financaj transigoj ne estis eblaj. Serveme kaj sindone li klopodis ĉiel por nia afero kaj ĝuis grandan estimon en registaraj rondoj. Esperantisto konvinkita li lernigis la lingvon al sia tuta familio. Lia memoro restos por longa tempo inter ni. Kara Radomir, ripozu en paco. *H.J.*

Korekto. Sur paĝo 296 (novembra numero) en la poemo Antaŭ Spegulo la 2-a verso de la unua strofo devas teksti :


Aĥ, spegul', spegul', ĉu vi ne

mensogas ?

Sur p. 297 en la poemo Leprulo la 2-a verso de la 3-a strofo devas teksti :

sendenta buŝ' ululas,

kaj en la sekva verso la vorto *Ulas* devas esti ligita per streketo kun "hundaĉoj". Sube legu : "pro ĉiu puŝ' kaj prem'" (anstataŭ *ĉio*).



Radio kaj Esperanto

Ĉiujn informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo.

En la tabelo horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon.

Mallongigoj : I=Informoj, P=Parolado, K=Kurso.

Lundo	12.30–13.00	La Coruña. 250m. P.K. Radio Juventud, Real 71, La Coruña, Hispanujo.
	22.10–22.20	Wien. 513m., 48.74m., 25.46m. I. Radio Wien, Argentinierstr. 30a, Wien IV., Aŭstrujo.
Mardo	11.55–12.00	Bern. 48.66m., 31.46m., 16.87m. P. D-ro Baur. SRG, Kurzwellendienst, Neuengasse 23, Bern.
	14.30–14.45	Montevideo. 280m. P. Radio Ministerio Ganaderia y Agricultura, Montevideo, Urugvajo (nur la unuan mardon de ĉiu monato).
	17.35–17.40	Bern. 48.66m., 31.46m., 25.61m. P. D-ro Baur.
Merkredo	15.30–15.40	Wien. 203m., 48m., 41m., 30m., 25m.
	16.00–16.10	Caramulo. 205m. I. Rádio Polo Norte, Caramulo, Portugalujo.
	17.50–18.10	Roma. 49.92m., 31.35m. P. S-ro Minnaja. Radio Roma, Casella postale 320, Roma, Italujo.
	19.30–19.45	Barcelona. 360m. I.K. Radio Unión, Emisora del Frente de Juventudes, Barcelona, Hispanujo.
	22.15–22.20	Hilversum. 298m., 188m. I. V.A.R.A., Heuvellaan 33, Hilversum, Nederlando.
	22.15–22.30	Hilversum. 402m. P. (nur 24-XI, 22-XII). N.C.R.V. Schuttersweg 8, Hilversum, Nederlando.
Ĵaŭdo	08.30–08.45	Paris. 348m. K. Esperanto-Office, Orléans (Loiret), Francujo.
	11.55–12.00	Bern. Kiel marde. P. D-ro Privat.
	17.35–17.40	Bern. Kiel marde. P. D-ro Privat.
	22.30–23.00	Valencia. 200,. P. Radio Alerta, Colón 11, Valencia, Hispanujo.
	22.50–23.10	Zagreb. 264.7m. I. Radio-Zagreb, Jugoslavujo.
Vendredo	17.50–18.10	Roma. Kiel merkrede. P. D-ro Musella.
	21.30–21.45	Guatemala Cd. 470m., 197m., 47m., 30.50m., I. Radio Esperanto, la Voz de Guatemala, Gvatemalo, Mez-Ameriko.
Sabato	08.30–09.00	Rio de Janeiro. 375m., 30.71m. K.I. Radio Ministério da Educação, Rio de Janeiro (DF), Brazilo.
	22.15–22.20	Hilversum. 402m. P. K.R.O., Emmastraat 52, Hilversum, Nederlando.

Radio Roma. 1-XII, Informoj el Italujo ; 3-XII, Itala belarta urbo Mantova ; 8-XII, Strato Margutta, centro de la artista vivo en Romo ; 10-XII, Leterkesto kaj bibliografio ; 15-XII, L. L. Zamenhof, la poeto de la tutmonda frateco ; 17-XII, Universala geniulo Michelangelo ; 22-XII, Kristnaskaj kantoj ; 24-XII, la Kristnaska Nokto ; 29-XII, la mirindaj grotoj de Castellana ; 31-XII, la lasta tago de la jaro.

Radio Lille. Prof-o Labit bedaŭre anoncas la decidon de la Lille-Staciestro ĉesigi la ĉiusemajnan programon regule elsenditan dum la kvar pasintaj jaroj. La motivo de tiu decido, jam aludita en nia februara rubriko estas, ke la tro malgranda nombro de ricevataj leteroj montras nesufiĉan intereson de la aŭskultantaro al tiaj programoj.

Esperanto-Kurso. Ĉiuĵaŭde, “Perpignan-Roussillon” dissendos Esperanto-kurson de S-ro René Llech-Walter kaj S-ro Robert Gendre je la 7-a 45 m. (202 metroj).

La M.M.O.


Tri Stadioj en Tutmonda Meteorologio

LA Monda Meteorologia Organizaĵo estas Specialigita Institucio de la Unuiĝintaj Nacioj, kreita por kunordigi, normigi kaj plibonigi la servojn faritajn de la meteorologio tra la mondo por diversaj homaj aktivecoj. Ĝiaj membroj inkluzivas pli ol 80 landojn. Iu ajn ŝtato aŭ teritorio kiu administras sian propran Meteorologian Servon povas fariĝi Membro de MMO.

1878—Kreo de la I.M.O.

En la jaro 1878 la Internacia Meteorologia Organizaĵo estis kreita dum internacia konferenco en Utrecht (Nederlando). Ĝi konsistis el la Direktoroj de naciaj Meteorologiaj Servoj.

Dum la nuna jarcento la grandega evoluo de transportiloj kaj komunikiloj (mara kaj aera navigacio—



Meteorologia helpo por la sekureco de aera kaj mara vojaĝado.

La atmosfero de la tero, vetero kaj klimato ne respektas politikajn landlimojn kaj ili kreas multajn similajn problemojn por ĉiu ĉie en la mondo. Komprenante ke grandskala internacia kunlaborado necesas por solvi tiujn problemojn, la nacioj de la mondo kunklopodas por apliki haveblan scion pri la vetero kaj ĝia evoluo al la ĉefaj homaj aktivecoj.

Post la jaro 1853 oni klopodis prepari programon de meteorologiaj observoj super la oceanoj bazitan sur la kunlaborado de la ŝipoj apartenantaj al la plejmulto de la maraj landoj.

radiotelegrafo) kaj la pli grandaj bezonoj de moderna ekonomia aktiveco naskigis multajn teknikajn problemojn kaj substrekis la gravecon de meteorologio. Samtempe la miriga evoluo de teknologio ebligis al ĉi tiu relative juna scienco fari konsiderindan progreson. Tiuj novaj faktoj pruvis ke reorganizo je internacia nivelo necesis pro la pli granda intereso de ŝtatoj pri meteorologio.

1951

Monda Meteorologia Konvencio

Konsekvence la Konferenco de Direktoroj de la naciaj Meteorologiaj

Servoj kiu kunvenis en Washington en 1947 sub la patroneco de la Internacia Meteorologia Organizaĵo akceptis la Mondan Meteorologian Konvencion kiu starigis novan organizaĵon fonditan sur kontrakto inter registaroj.


1951

Monda Meteorologia Organizaĵo

Ĉi tiun Konvencion ratifis multaj ŝtatoj kaj en 1951 la antaŭa organizaĵo dissolviĝis kaj la nova Monda Meteorologia Organizaĵo ekagadis. Plue la Ĝenerala Asembleo de la Unuiĝintaj Nacioj aprobis, en

pri la malebligo de la detruego kaŭzata de vetero kaj pri klimata adaptiĝo celanta pligrandan produkton. Por atingi tion observoj de pezoforto, temperaturo, vento, pluvo kaj aliaj elementoj estas farataj sur la tero kaj en la supera aero ĉe multnombraj stacioj starigitaj tiucele tra la mondo. La faktoj akiritaj estas transsendataj tuj per la plej rapidaj rimedoj haveblaj (radio-telegrafo, radiotelefonio, telepresiloj) al centrejoj kiuj analizas ilin kaj preparas veterkartojn. Ĉi tiuj kartoĵoj estas uzataj por prepari antaŭdirojn de la vetero por aeroplanoj, ŝipoj,

*Observoj en la supera
aero je grandaj altecoj per
radio kaj radaro.*



Decembro 1951, la kontrakton inter la Unuiĝintaj Nacioj kaj la Monda Meteorologia Organizaĵo. Ĉi tiu estis tiel rekonata de la Unuiĝintaj Nacioj kiel Specialigita Institucio.

La Meteorologio Rapide Evoluanta Scienco

Perdo de homaj vivoj, detruo de rikoltoj, arbaraj brulegoj, aeroplano perdita—tiuj estas ĉiutagaj ekzemploj de la sortobatoj ofte rezultantaj de la kapricoj de la vetero.

La praktikaj celoj de la meteorologio estas instrui, averti kaj konsili la homaron pri la vetero kaj tiel helpi

agrikulturo kaj por la ĝenerala publiko.

Tamen la antaŭdirado ne estas la nura kontribuo de la meteorologio al la naciaj ekonomioj. La arkivoj kaj statistikaj analizoj de observoj faritaj dum pasintaj jardekoj ebligas al Meteorologiaj Servoj provizi al multaj homoj en diversaj medioj informojn pri klimato kaj ĝia evoluo ; ekzemple


informaĵo estas donata al oficialaj kaj privataj entreprenoj de publika konstruado kaj konstrua inĝenierado antaŭ la realigo de grandaj hidroelektraj projektoj aŭ urbo-planado ;

farmistoj deziras scii la plej bonan tempon semi, fari fojnon kaj rikolti kaj ankaŭ la plej taŭgajn rikoltaĵojn en la klimato de siaj regionoj ;

leĝaj aŭtoritatoj kaj asekurecaj kompanioj demandas precizan kaj oficialan informadon pri veteraj kondiĉoj je kelkaj gravaj datoj rilatantaj al aferoj kiujn ili traktas.

Multaj aliaj ekzemploj estas citeblaj de la praktika aplikado de la meteorologio al la publika sano, transportado kaj aliaj problemoj de ĉiutaga vivo. Tamen ne sufiĉas por la studado de klimato kaj la preparado

kaj kunordigi ilin. Hodiaŭ ĉiuj tiuj stacioj faras siajn observojn samhore en ĉiu lando de la mondo per instrumentoj alnormigitaj kaj komparitaj al internaciaj modelaj mezuriloj. La faktoj akiritaj estas transdonataj multajn fojojn ĉiutage je fiksitaj horoj kaj dum la tuta jaro, ne nur al naciaj centrejoj sed ankaŭ al centrejoj kiuj servas parton aŭ la tuton de kontinento. La kontinentaj centrejoj dissendas elektitajn observojn kaj tiel ebligas desegni veterkartojn plurfoje ĉiutage por grandaj partoj de la terglobo. Tiu uniformeco kaj kunordigo estas



La vetero influas agrikulturon kaj la produkton de hidroelektra energio.

de antaŭdiroj scii la karakteron de la vetero en unu sola lando ; informado estas bezonata pri la veteraj kondiĉoj super la tuto aŭ minimume super la pli granda parto de la koncerna kontinento.

Estas pro tio ke internacia kunlaborado pri meteorologio fariĝis praktika kaj ĉiutaga realaĵo ; estas plenumante ĉi tiun kunlaboradon ke MMO ludas sian rolon.

La M.M.O. Internacia Peranto

Necesis por la praktika uzado kaj komparado de observoj faritaj de veteraj stacioj tra la mondo normigi

akiritaj dank' al la komunaj reguloj kaj la rekomendoj de la Monda Meteorologia Organizaĵo. *La unika karaktero de meteorologia kunlaborado en la mondo konsistas el la konstanta kaj ĉiutaga aplikado de internaciaj decidoj.*


Tamen MMO ne nur faras regulojn kaj normojn ; ĝi ankaŭ realigas projektojn kiuj interesas al ĉiuj ŝtatoj kaj kiuj estas tro vastaj por nacia agado. En 1953 la programo de la Organizaĵo inkluzivis la preparon de tutmondaj kartoj de tondraj uraganoj kaj la eldonon de internacia atlaso de nuboj entenanta fotografaĵojn de ĉiuj

specoj de nuboj observitaj tra la mondo, ekde la polusoj ĝis la inter-tropikaj zonoj. La MMO ankaŭ partoprenas en esplorado pri la sekegaj zonoj kaj faras kontribuon al la plibonigo de sekega tero studante la klimatajn kondiĉojn en ĉi tiuj regionoj. Tutmondaj "tagoj" de esplorado pri la supera aero estas projektataj kun la aktiva kunlaborado de la Organizaĵo. La batalo kontraŭ la akridoj kaj la protekto de rikoltoj kontraŭ tiu plago estas komuna entrepreno al kiu la MMO kontribuas. Alia grava agado de la Organizaĵo estas stimuli sciencan esploron kaj

informita la Membrojn kaj ĉiujn interesitajn personojn.

La MMO ludas tre aktivan rolon en la Pligrandigita Programo de Teknika Helpo de la Unuiĝintaj Nacioj por la ekonomia evoluigo de subevoluitaj landoj.. En ĉi tiu programo de la Unuiĝintaj Nacioj, la Organizaĵo kontribuas al la starigo kaj evoluigo de naciaj Meteorologiaj Servoj. Ĝi ankaŭ helpas pri la instruado de meteorologistoj kaj fakuloj en ĉiu fako de la veteroscienco. Spertuloj estas komisiataj por studi lokajn kondiĉojn kaj por elserĉi la plej taŭgajn rimedojn solvi la apartajn

Internacia interŝanĝo de meteorologiaj raportoj.



instruadon pri meteorologio per ĉiuj eblaj rimedoj. La MMO kolektas kaj disponigas al ĉiuj naciaj Meteorologiaj Servoj informojn pri la regiona kaj internacia organizo de meteorologia aktiveco.

Por simpligi la laboron de naciaj Servoj, la diversaj internaciaj decidoj estas enkorpiigitaj en teknikajn regularojn kiuj post akcepto fariĝas devigaj por ĉiuj Membroj. Multaj teknikaj verkoj estas eldonataj de la MMO por uzantoj de meteorologio kaj specialigitaj teknikistoj. Regula gazeto de informado, la Bulteno de MMO estas eldonata por teni plene

problemojn de la koncernaj landoj. Oni povas diri mallonge ke la rolo de MMO estas provizi teknikan helpon por faciligi teknikan progreson sur la ĝenerala kampo de ekonomia evoluo. Efektivigante sian programon de teknika helpo, same kiel sur aliaj kampoj de agado, MMO kunlaboras intime kun la Unuiĝintaj Nacioj kaj kun la aliaj Specialigitaj Institucioj.

La Strukturo de la MMO

Monda Meteorologia Kongreso

La Monda Meteorologia Kongreso kunvenigas la reprezentantojn de ĉiuj

Membroj, Ŝtatoj kaj Teritorioj, minimume unu fojon dum ĉiuj kvar jaroj. Ĝi estas la superega organo de la Organizaĵo kaj akceptas la teknikajn regulojn rilatantajn al la meteorologia praktiko. Ĝi decidas la politikon, la programon kaj la budĝeton de la MMO.

Plenumkomitato

La *Plenumkomitato* kontrolas la plenumadon de la resolucioj de la Kongreso kaj de la teknika regularo. Ĝi kunvenas minimume unu fojon ĉiujare kaj preparas studojn kaj rekomendojn pri ĉiu meteorologia demando kun internacia intereso. Ĝi provizas al Membroj de la MMO teknikan informaĵon kaj konsilon kaj helpas ilin en la limoj de la komisiono de la Organizaĵo. Ĝi konsistas el 15 membroj inter kiuj estas la Prezidanto de la MMO kaj la Prezidanto de la ses Regionaj Asocioj de la MMO.

Regionaj Asocioj

Ĉi tiuj *Regionaj Asocioj* (por Afriko, Azio, Sudameriko, Norda kaj Centra Ameriko, Sudokcidenta Pacifiko kaj Eŭropo) konsistas el Membroj, kaj Ŝtatoj kaj Teritorioj, kies servoj estas en la regiono. Ilia tasko estas ekzameni laŭ la regiona vidpunkto ĉiujn demandojn transdonitajn al ili de la Plenumkomitato kaj kunordigi meteorologian agadon interne de iliaj respektivaj regionoj.

Teknikaj Komisionoj

La *Teknikaj Komisionoj*, kiuj konsistas el spertuloj, estas starigitaj

de la Kongreso por studi la aplikojn de la meteorologio kaj de la specialaj teknikaj fakoj kiuj rilatas al la studado kaj observado de la vetero. Ili akceptas teknikajn rekomendojn kiuj poste estas metataj antaŭ la Plenumkomitato kaj la Kongreso por aprobo. Estas nuntempe ok tiaj komisionoj, nome :—

- (1) Agrikultura Meteorologio
- (2) Mara Meteorologio
- (3) Aeronautika Meteorologio
- (4) Sinoptika Meteorologio
- (5) Aerologio
- (6) Klimatologio
- (7) Instrumentoj kaj Metodoj de Observado
- (8) Bibliografio kaj Eldonaĵoj.

La Sekretariaro

La *Sekretariaro*, kiu situas en Ĝenevo (Svislando) kompletigas la strukturon de la MMO. Ĝia internacia oficistaro, sub la gvidado de la Ĝenerala Sekretario, plenumas la teknikan kaj administran laboron de la Organizaĵo. Ĝi entreprenas teknikajn studojn, preparas la specialigitajn internaciajn eldonaĵojn, rolas kiel sekretariaro dum la kunvenoj de la diversaj organoj de la MMO kaj ĝenerale agas kiel ligilo inter la Meteorologiaj Servoj de la Mondo. (Alia el ĝiaj taskoj estas informi ŝtatojn kiuj ne estas Membroj de la Organizaĵo kaj la ĝeneralan publikon pri la agado de MMO kaj pri la decidoj de ĝiaj organoj.)

Trad. Ralph Harry.



Tra la Libraro

Duope ricevitaĵajn verkojn ni recenzas ;
unuope ricevitaĵajn nur mencias.

*=akireblaj ĉe U.E.A.

*La recenzinto estas libera en sia prijuĝo de verkaĵo.
Lia opinio ne ligas la Asocion aŭ la Estraron de U.E.A.*

***La Internacia Lingvo** (*Faktoj pri Esperanto*) redaktita originale en Esperanto de D-ro Ivo Lapenna, eksprofesoro en la Universitato de Zagreb, honorofica direktoro de CED. 192 paĝoj. 10ŝ. aŭfranko 6p. Eldonis Universala Esperanto-Asocio, Centro de Esploroj kaj Dokumentado, Londono 1954.

Por ĉiu etapo en la evoluo de nia movado ni bezonas informojn pri la celoj jam atingitaj aŭ ankoraŭ atingotaj. Antaŭ proksimume tridek jaroj eldoniĝis la bela *Historio de Esperanto* de D-ro Privat, kiu siatempe estis unu el niaj plej gravaj armiloj. Nuntempe la Estraro de UEA havis la bonan ideon komisi al D-ro Ivo Lapenna ĝisdatigi kaj aktualigi la faktojn. Li kolektis materialon por la kandidateco de UEA je la Nobel-premio, kaj UEA decidis aperigi en formo de libro la tekston, kiun li bazigis sur la dokumentaro kribrita kaj ellaborita. Kun la objektiveco de lerta juristo kaj la instruosperto de akademia profesoro D-ro Lapenna estis aparte taŭga por entrepreni tian gravan taskon.

La verko parceliĝas en tri partojn. La temo de la unua estas la estiĝo, naturo kaj valoro de Esperanto kiel solvo de la problemo de internacia lingvo. Ĝi prezentas valorajn detalojn pri diverslingvaj ŝlosiloj, lernolibroj, kursoj (privataj, lerneaj kaj universitataj), kaj koncize resumas

la historion de la literaturo Esperanta, ne nur la beletristika aŭ imaga, sed ankaŭ la fakverkoj, leksikonoj kaj gazetoj. En la sekvanta ĉapitro temas pri la praktika aplikado de Esperanto al komerco, turismo, radio, poŝto, sonfilmoj k.t.p. Ĝi enhavas krome kelkajn detalojn, cetere tre bonvenajn, pri la Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno.

La dua parto enigis en naŭ paĝojn donitaĵojn pri la diversaj landaj organizaĵoj, ĉu aliĝintaj al UEA, ĉu restantaj ekstere, ankaŭ la fakaj organizaĵoj. Sur p. 128 ni povas informiĝi mallonge pri SAT, de kiu aparta historio eldoniĝis en Parizo en 1953. La tria parto estas dediĉita ekskluzive al UEA. Ĝi enhavas sufiĉe plenan historion, tre klaran priskribon de la nuna organiza formo, sekcion pri la Internacia Somera Universitato kaj pri diversaj konkursoj kaj, fine, tre informoriĉan ĉapitron pri la praktikaj servoj de UEA, ekz. delegitoj, koresponda kaj gazeta servo.

Bonstile redaktita, ĉi-tiu verko prezentas al ĉiu scivolemulo abundajn riĉaĵojn, el kiuj li povas ĉerpi freŝan konon pri la movado. Bibliografio kaj zorge kompilita indekso plialtigas ĝian konsultvaloron. Trafoliumante la libron mi miris pri la senmakula teksto. Se dua eldono postuliĝos, mi havas kelkajn bagatelajn sugestojn por suplementado. Kvankam mi bone komprenas la ĉagrenon kaj

koleron, kiujn multaj Esperantistoj sentas rilate al la agado de IALA, estas juste niaparte agnoski kelkajn servojn kiujn IALA faris al ni en la jardudeko post la unua milito. Per subteno de eksperimentaj Esperanto-kursoj en Usonaj lernejoj IALA altiris la atenton de eminentaj psikologoj kaj pedagogiuloj al la supereco de Esperanto en la unuaj stadioj de lingvo-lernado. Per la *General Language Course* de Helen Eaton, IALA montris kiel praktike Esperanto povas konduki al la kompreno de lingvo-sciencaj problemoj. Krome, la bibliografio de Stojan havis la valoran apogon de IALA. Miaj ceteraj observoj estas personaj. Sur paĝo 92 mi estus laŭdinta la vortaron de Millidge ne nur pro la nomoj de plantoj kaj bestoj, sed ankoraŭ pli forte pro la abundeco de kunmetaĵoj, derivaĵoj kaj frazoj donitaj kun la radiko. Tiurilate ankaŭ la enciklopedia vortaro de Wüster estas aparte laŭdinda.

Sume, ni kore gratulas UEA pro la iniciato de ĉi-tiu verko kaj pro la belaj formato kaj bindaĵo. Ni ĉiuj ŝuldas la plej varman dankon al nia ĉampiono D-ro Lapenna pro lia sindona laboro kaj lerta ekspertizo.

Liverpool

W. E. Collinson

Nia Forumo, fino.

Sovetio. Al mi ŝajnas, ke la aŭtoritato de la uzado, precipe ĉe la koncerna popolo, devus pli imponi, ol proponaĵoj de alilingvaj vortaristoj. Cetere nia korespondanto notas nur unu principon por transpreno en Esperanton de fremda vorto. Dua estas la konsidero pri la ortografio, kaj taŭga formo ofte estas kompromiso aŭ ekvilibro de la du principoj.—R.R.



KAŬZE de la emeritiĝo de nia Ĝenerala Sekretario, S-ro Goldsmith, la Estraro de U.E.A. elektis kiel Helpredaktoron S-ron Reto Rossetti, kiu ekde nun prizorgos ankaŭ la teknikajn detalojn de la eldonado. Ĝis nun S-roj Goldsmith kaj Rapley plenumis tiun laboron en la Centra Oficejo. Dum longaj periodoj ankaŭ S-ino E. Oliver kun multe da amo kaj energio estis la nevidebla kaj deĉiuj nekonata prizorgantino de nia revuo. Mi prezentas al ili la dankon de nia Asocio pro ilia fidela kaj sukcesa kontribuo, kaj nun bondeziras al nia nova Helpredaktoro.

E. Malmgren,
Prezidanto de U.E.A.

Romankonkurso. La juĝa komisiono de la Romankonkurso, laŭ la decido de la Estraro, estas Akademianoj Teo Jung, Juan Régulo Pérez kaj Ferenc Szilágyi. (Vidu p. 206 en la juli-aŭgusta numero.)

Enigma Konkurso : Solvoj

La desegnaĵo de ĉi tiu solvo estas absolute identa al tiu de la enigmo. Mi nigrigis nur randojn ĉirkaŭ la kvar linioj kaj striojn inter la vortoj, kaj nun la vortoj estas legeblaj.

Solvoj :

N-ro 207 : Multaj leteroj pruvas, ke granda nombro da legantoj solvas la enigmojn, sed, ne ensendante la solvojn, oni endanĝerigas la ekzistadon de la enigma konkurso.

N-ro 208 : De tro da pano venas malsano. pasero-adreso ; brusto-butero ; kaporo-torako ; aneksi-rikane ; sprita-pirato ; valoro-dolaro ; striko-kiraso ; strato-pastro ; artikokataro ; tetano-anteno ; transasatano ; retino-vintro ; klafto-takelo ; teorio-tenoro ; staplo-palato ; trunkokrusto ; kazino-maniko ; tindrodinaro ; kanapo-planko ; batalosabato ; taroko-karato ; ĉambrobranĉo ; trombo-motoro.

Gajnis la premiojn post kontrolo de la 89-a konkurso : S-ro I. Ekström (Finl) 116, F-ino N. Hanson (Brit) 116, S-ro A. de Vries (Ned) 110 p.

La oficiala organo de la aŭstria registaro "Wiener Zeitung" de 10 Oktobro, 1954, publikigas sur la unua paĝo sub la rubriko Oficialaj sciigoj pri personoj jenon :

*La Federacia Prezidanto per decido de la 28-a de Septembro 1954 distingis la Kortegan Konsiliston **Hugo Steiner** per la Ora Honorinsigno por Meritoj je la Respubliko Aŭstrio.*

Ni ĝoje gratulas nian ŝatatan samideanon pro la elita honoro.

La Verkaro de Zamenhof : fino

La libro estas finkompostita kaj la presistoj promesis ke ĝi estos preta en Januaro, 1955. Ĝi estas presata sur tre bona papero per klara kaj plaĉa literaro, kaj bele bindata en stilo inda al tia verko. Se tiu libro trovos bonan akcepton la eldonejo intencas eldoni iom post iom la aliajn librojn en simila stilo. Povos esti, ke la sekvonta libro estos *Lingvaj Respondoj* kaj *La Proverbaro* en unu volumo, sed definitiva decido ne estas farita.

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Centra Oficejo : Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

OFICIALA INFORMILO

N-ro 266

1an de novembro 1954

STATISTIKO. Jen la stato de la membraro je la fino de oktobro, kaj ankaŭ, por komparo, je la fino de oktobro 1953 :

	1953	1954
Asociaj membroj ..	7894	8873
Individuaj Membroj :		
MJ	900	1001
MA	3892	3926
MS	606	729
Patronoj	6	7
DM	261	277
HM	58	59
	5723	5999
	13617	14872

DELEGITOJ

Britujo

Dunstable (Beds.). FD (Plastaĵoj) : M. Lewin, 33 Kingscroft Avenue. Tel : 674.

Swindon (Wilts.). D : vakas.

Long Wittenham (Berks.). D : R. England, The Three Poplars, Long Wittenham, Abingdon.

Westcliff-on-Sea (Essex). D : vakas.

Ĉeĥoslovakujo

Martin. D : E. V. Tvarožek, vydavatel'stvo Osveta n.p.

Germanujo

Bamberg (13a). D : R. Brand, Fohlen-gartenstr. 10.

Bielefeld (Westfalen). D kaj FD : vakas.

Bonn (22c). FD (Bankaj aferoj) : J. B. Suermann, Muensterplatz 1. Tel : 38063.

Göttingen. FD (Geodezio) : H. Michling, Lotzestrasse 39. Oficejo : Stadthaus, Paulinerstrasse. Tel : 4251 (subnumero 432).

Langen b. Frankfurt-M. (16). W. Scheer, Marienstrasse 7.

Lehrte. D : H. Müller, Am Gehrkamp 27-I.

München. FD (Tekniko) : H. Spirat, Attenkoferstr. 55/0, München-25.

Grekujo

Patrai. D : F-ino K. Polimeropoulou, Odôs Sotiriadi 34. Tel : 36-95.

Hispanujo

Cabrils (Barcelona). D : S. Roca Rodó, Cabrils.

Irlando

Dublin. FD (Turismo) : P. J. O'Reilly, 190 Philipsburgh Avenue, Fairview.

Italujo

Alessandria. FD (Stenografio) : C. Daglio, Alessandria (Littaparodi).

Izraelo

Nahariya (Galil). FD (Ekonomio) : G. Hirsch, Hamejasdimstr.

Libio

Tripoli. D : D. Vertillo, Sciara Verdi N.11.

Nederlando

Den Haag. FD (Statistiko) : H. Kervers, v. Slingelandtstraat 22.

Driebergen-Rijsenburg (Utrecht). D : S-ino H. E. te Strake-Leefers, Lindelaan 14.

Groningen. D : S-ino L. de Vries-Kanning, IJsselstraat 41 B.

Norvegujo

Gjøvik (Vestoppland fylke). D : A. G. Langseth, Bassinv. 3.

Svedujo

Höje (Värmland). FD (Sociaj aferoj) : La D.

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

O. Rieckhoff, Lemförde, Germanujo
Prof. B. Popović, Sarajevo, Jugoslavujo
D. Tachauer, Ascalon-shore, Izraelo

MEMBRO-SUBTENANTOJ 1954

735. Pereira Nunes, S-ro E., São Paulo, Brazilo

736. Bellatti, S-ro S. E., Battle, Anglujo

PATRONOJ 1955

1. Williams, D-ro F. J., East Melbourne, Aŭstralio

2. Wooding, S-ro N., Leicester, Anglujo

MEMBRO-SUBTENANTOJ 1955

1. Bluett, S-ro T. L. C., Truro, Anglujo

2. Boatman, S-ro D. P., Westcliff-on-Sea, Anglujo

3. Boulton, F-ino M., Stoke-on-Trent, Anglujo

4. Fraser, S-ro T. C., Kirkcaldy, Skotlando

5. Jordon, S-ro H., Brighton, Anglujo

6. Kennedy, S-ro D., Bishop Auckland, Anglujo
7. Kennedy, S-ino M., Bishop Auckland, Anglujo
8. Knight, S-ro F. E., Dorchester, Anglujo
9. Miller, S-ro J. R., Stone, Anglujo
10. Mills, F-ino C., Manchester, Anglujo
11. Riding, F-ino E., Herne Bay, Anglujo
12. Robson, S-ro B., Cheam, Anglujo
13. Visser, S-ro N., London, Anglujo
14. Worcester, S-ino D. M., London, Anglujo
15. Weile, S-ro K., Fuglebjerg, Danlando
16. Dresselhaus-Brockmann, S-ro H., Schloss Holte, Germanujo
17. Helfers, S-ro F., Karlsruhe, Germanujo
18. Jaehn, S-ro W., Düsseldorf, Germanujo
19. Schönrich, S-ro K., Wiesbaden, Germanujo
20. Abul-Dahab, S-ro F. S., Beirout, Libano
21. Pfanner, S-ro J. R., Sierra Leone, Okcidenta Afriko
22. Baumslag, S-ro K., Johannesburg, Sudafriko
23. Björne, S-ro K., Lidingö, Svedujo
24. Boone, S-ro I., Mays Landing, N.J., Usono
25. Aprozio, S-ro E., Torino, Italujo
26. Lapenna, S-ino E., Zagreb, Jugoslavujo
27. Guise, S-ro W. C., Rugby, Anglujo
28. Houghton, S-ro C. M., Welwyn Garden City, Anglujo
29. Meacock, S-ro M., Walton-on-Thames, Anglujo
30. Pearson, F-ino E. M., York, Anglujo
31. Roome, S-ro G. W., Sheffield, Anglujo
32. Shaw, S-ro F. W., Whitworth, Anglujo
33. Stone-Fry, S-ro G., London, Anglujo
34. Barta, S-ro R., Denver, Colorado, Usono
35. Teltz, S-ro F., Gelsenkirchen, Germanujo
36. Frick, F-ino K., Wiesbaden, Germanujo
37. Link, S-ro K., Heidelberg, Germanujo
38. Raab, S-ro J. M., Nürnberg, Germanujo
39. Suermann, S-ro J., Bonn, Germanujo

DONACOJ al la Ĝenerala Kaso : H. C. Allen 5ŝ., S-ino E. Greenwood 10ŝ., F. E. Knight 5ŝ., E. B. Johnson £1, S-ino A. Bramkamp-Weber 10ŝ., F. Moravec 5ŝ., D-ro H. Wehrheim 13ŝ., I. Boone 14ŝ., N. G. Nilsson 8ŝ.

DONACOJ al la Fondaĵo Montevideo : Ges-roj W. Laurie £1, E-grupo Stuttgart 16ŝ. 6p., L. Joliet 5ŝ., R. Molera £1, R. Zollinger £2 16ŝ.

Sumo ĝis 30.10.1954 : \$1,144 5ŝ. 6p.

Sinceran dankon al ĉiu helpanto.

C. C. GOLDSMITH, Sekretario.


Internacia Konkurso 1954



Stato je la 31a de oktobro

Lando	Kvoto	Poentoj	%
1. Finnlando ..	2000	2825	141.25
2. Kanado ..	250	345	138.0
3. Sudafriko ..	300	395	131.6
4. Svislando ..	1500	1790	119.3
5. Germanujo ..	3600	4200	116.6
6. Maroko ..	700	805	115.0
7. Urugvajo ..	250	285	114.0
8. Nederlando ..	4600	5140	111.7
9. Svedujo ..	5900	6559	111.2
10. Danlando ..	2500	2775	111.0
11. Jugoslavujo ..	1600	1766	110.4
12. Italujo ..	2900	3150	108.6
13. Usono ..	2300	2371	103.1
14. Portugalujo ..	500	515	103.0
15. Hispanujo ..	1600	1620	101.3
16. Japanujo ..	900	905	100.6
17. Izraelo ..	250	260	100.4
18. Francujo ..	5600	5557	99.2
19. Aŭstralio ..	1000	990	99.0
20. Islando ..	350	345	98.5
21. Aŭstrujo ..	850	830	97.6
22. Britujo ..	9500	8919	93.9
23. Novzelando ..	850	786	92.4
24. Kubo ..	250	220	88.0
25. Norvegujo ..	2300	1989	86.5
26. Belgujo ..	2300	1970	85.7
27. Irlando ..	250	185	74.0
28. Venezuelo ..	250	165	66.0
29. Brazilo ..	6400	4270	65.1
30. Argentino ..	950	615	64.7

Ekzistas loko en la Centra Oficejo por kapabla oficisto, proks. 20-30 jaraĝa. Necesa kvalito estas precizeco en detala laboro. Eventuale ankaŭ junulino konsiderata por tiu posteno. Skribu al la Sekretario por detaloj.



ANONCETOJ

Kosto : du pencoj por ĉiu vorto, aŭ internacia respondkupono por ĉiu duo da vortoj.

Ĉiu anoncanto morale devigas sin respondi minimume unu fojon al ĉiu kiu skribas.

Anonceto por iu numero devas atingi nin antaŭ la 6-a de la antaŭa monato.

Kaj kiam la anĝeloj foriris de ili en la ĉielon, la paŝtistoj diris unu al alia : Ni jam iru ĝis Bet-Leĥem, kaj vidu ĉi tiun okazintaĵon, kiun la Eternulo sciigis al ni.

S-ta Luko 2. 15.

Em Swedenborg, sveda sciencisto kaj klarvidulo, rivelas en siaj religiaj verkoj la novan lumon pri la koncepto de Dio kaj postmorta vivo. Lia filozofio akordigas la religion kun la scienco kaj baziĝas je la spirita senco de S. Biblio. La traktatojn senpage vi ricevos, se eble kontraŭ 1 resp. kup., ĉe : Jan B. Vlach, Luzická 21, PRAHA XII, Ĉeĥoslovakio.

Zorgistino bezonata pri 10 junaj knaboj en sendependa lernejo ; samideanino preferinda. Lokoj restas ankoraŭ por internuloj el eksterlando. Vidu jarlibron (unuan parton) pp. 45 kaj 126. Lernejestro, Nikune, Langley Grange, Ifield, CRAWLEY, Sussex, Anglujo.

Mi serĉas kontakton por interŝanĝo de naturaj fotoj (koloraj transparentoj). Ĉiuj landoj dezirataj ! Skribu Esperante, Angle aŭ Germane. Adreso : J. Priplata, Box 5312 G.P.O., SYDNEY, Aŭstralio.

Dum Bologna Kongreso mi organizos interesan trisemajnan malmultekostan viziton de Italujo per komforta aŭtobuso. Decidu frue vian vojaĝplanon, la lando estos plenplena de turistoj, antaŭmendu hotelojn. Represo petata. Angelo Lovati, Via Lipari 8, MILANO, Italujo.

Nia klubo festos sian 25-jaran jubileon la 26-an de marto 1955 kaj danke akceptos salutojn el la tuta mondo. La Esperanto-klubo de Lidköping, adr. Åke Blomberg, Lottkällsgatan 2, LIDKÖPING, Svedujo.

Delegitino en Kameruno, kiu provis kaj sukcesis malfermi kursojn en sia Afrika lando, ricevus volonte ĉiajn propragandilojn aŭ gazetojn kiuj helpus ŝin. Skribu al : Suzanne Eymin, FOUMBOT, Cameroun.

Fonetiko : fonologio. Pri viaj lingvoj reciproke transdonu viajn sciojn al Manuel Gomes, VELAS, S. Jorge, Acoroj.

50 mezgradaj gelernantoj, 12-15 jaraj, deziras Esp-korespondadon kaj interŝanĝon de ĉiuj kolektaĵoj por infanoj. Esperanto-klubo "La vanelo", Strandboulev. 147, KØBENHAVN, Danlando.

Virinaj grupoj celantaj la malleĝigon de atombomboj bonvole skribu al S-ino Kidd, 18 St. Edmunds Lane, DUNMOW, Essex, Anglujo.

Meblistoj. Interesaj proponoj kun ĉiuj landoj pri someraj faldmebloj, baldaŭa kaj nepra respondo ; skribu al Salvador Escrihuela, C. San José 35, TABERNES DE VALLDIGNA (Valencia), Hispanujo.

Poŝtmarkojn deziras interŝanĝadi tutmonde kvanton kontraŭ kvanto. Adreso : José Bernardich, str. Manso 60, SABADELL, Hispanujo.

Francisco Palanques, P. San Juan 61.2.2, BARCELONA, Hispanujo, deziras korespondadon ĉiulandan.

Germana Esperantistino vizitos parencojn en Florida proksiman jaron kaj deziras viziti dumvoje gesamideanojn kiel paganta gasto por studi amerikan vivmanieron. Bonvolu skribi al S-ino K. Schmiedeberg, Renthof 9, (16) MARBURG, Germanujo.

16-18 jaraĝaj gelernantoj deziras korespondi kun samaĝuloj poŝtkarte. Roy Holland, 912 North Main Street, NAPERVILLE, Illinois, Usono.

Ĉiu Esperantisto nepre volos posedi

TRIBUTO AL NOBLA GENIULO

de F. R. Jones

Juvelo—ĉiu Esperantisto legu. Vere rekomendinda, traduko bona, stilo klara, preso kaj eksteraĵo plaĉa.

Heroldo de Esperanto.

Bele presita kaj bonlingva verko—vivanta kaj valora.

Ferenc Szilágyi en Arbetar Esperantisten. Tre altvalora, elokventa, pasia kaj nobla. Kara juvelo en nia biblioteko.

Oomoto.

Profunde impresis min—admirinda kaj leginda.

W. A. Gething en British Esperantist. Lukse broŝurita. Rekomendinda legaĵo.

La Ponto.

64 paĝoj en modela Esperanto. Eleganta, firma, kartonita kovrilo.

Esperanto et Culture.

Prezo 4 ŝil. anglaj, sendkosto 3p.

Mendu ĉe

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO,
Heronsgate, Rickmansworth, Anglujo.

LETEROJ DE L. L. ZAMENHOF

La tragedio de lia vivo rivelita
de lia ĵus retrovita korespondo
kun la francaj eminentuloj.
Prezentado kaj komentado de
Prof. G. Waringhien.

1a volumo, 1901–1906—388 paĝoj

2a volumo, 1907–1914—374 paĝoj

21 × 14.5cm., bindita

NUNA PREZO :

Ĉiu volumo 17ŝ. 6p., afr. 9p.

La korespondaĵoj de eminenta
homo ĉiam konigas detalojn de
vivo, karaktero kaj sentimento
de la skribinto tiel ke personaj
leteroj kompletigas biografiojn.
En tiu ĉi libro ne temas nur pri
leteroj de la majstro, sed ankaŭ
pri tiuj direktitaj al li de francaj
gvidantoj de nia ideo en la frua
epoko de la movado. Tiu ĉi
libro lumigas la pasintecon kaj
detruos aron da legendoj.

Mendu ĉe

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

HERONSGATE, RICKMANSWORTH, HERTS., ANGLUJO